

Whereas, we enjoyed comfortable accommodations and excellent support in the lounge and three additional classrooms;

Whereas, we experienced the warm hospitality of your diligent, kind, and effective staff;

Whereas, we enjoyed excellent food in the cafeteria and on-site housing;

Whereas, we were surrounded by many, easily accessible locations of interest in a beautiful city with such historic significance;

Whereas, participants from 11 countries were able to feel welcomed and included;

Therefore, Esperanto-USA and the Canadian Esperanto-Association, gathered in our Binational Congress, express profound thanks and deep appreciation to the administrators and the staff of Toronto Metropolitan University in Toronto, Ontario, who so graciously hosted our Binational Congress in July 2025.

PRO TIO, KE ni ĉiuj spertis tre agrablan kaj fruktodonan kongreson;

PRO TIO, KE ni ĝuis ampleksan programaron plene de diversaj elektoj;

PRO TIO, KE ni spertis mirinde bonan etoson de internacia amikeco, kiu subtenas la valorojn de nia organizaĵo;

PRO TIO, KE ni ĝuis tiom da interesaj prelegoj kaj konversacioj kun niaj honoraj gastoj;

PRO TIO, KE vi tre diligente, efike kaj sindediĉe plenumis ĉiujn bezonojn de la kongresanoj;

PRO TIO, KE ni ĝuis la plej grandan kongreson en Nord-Ameriko dum multaj jaroj;

TIAL, Esperanto-USA kaj KEA, kunvenante en dulanda kongreso, dankas al la Loka Kongresa Komitato, nome al James MACKEY, Jordan ZERO, Jed MELTZER, Jeremy BASS, John HUANG, Luis OBANDO, Ĵenja AMIS, Andy BLAIR, Amanda SCHMIDT, Brandon SOWERS, Brian HARMON, Karlo MAYS, kaj Garry EVANS, kiuj planis kaj gastigis nian Dulandan Kongreson en Toronto, Ontario, Kanado en Julio 2025.

PRO TIO, KE ili diligente laboris en la estraro dum tri agad-plenaj jaroj;

PRO TIO, KE li helpis starigi kaj subteni sistemon de regionaj kunordigantoj, per kiuj lokaj kluboj povus komuniki pli facile kun Esperanto-USA;

PRO TIO, KE ŝi forte kaj konstante dum sia deĵorperiodo subtenis kaj gvidis la rimedojn por edukado en Esperanto tra Usono;

PRO TIO, KE li partoprenis la komitaton por rilatoj kun prizonuloj, per kiu li helpas al Esperanto-USA prizorgi la rajtojn de prizonuloj kaj la sekurecon de siaj membroj;

PRO TIO, KE ŝi dediĉis multe da tempo por esplori la financajn aferojn de Esperanto-USA, kaj per tia laboro plifaciligis la komprenadon de la financoj de la organizaĵo por ĉiuj aliaj estraranoj;

PRO TIO, KE ili lasas la organizaĵon en pli bona stato;

TIAL Esperanto-USA dankas al Fred MEYERS III kaj Ruth (Margo) KEVESS-COHEN pro ilia servado al Esperanto-USA dum iliaj deĵorperiodoj en la estraro de Esperanto-USA.

PRO TIO, KE, en epoko de necertaj rilatoj inter niaj du landoj,
Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto Asocio kunlaboras en amikeco;

PRO TIO, KE ni etendas la manon de internacia amikeco unu al la alia

PRO TIO, KE ni ĝuas etoson de internacia amikeco en epoko, kiam
malamikeco kaj eĉ malamo kreskas;

PRO TIO, KE ni esperas kunlabori plue por forigi la obstinajn barojn, kiuj
dividas ne nur niajn du landojn unu de la alia, sed ankaŭ multajn landojn;

TIAL Esperanto-USA kaj KEA, kunvenante en sia dulanda kongreso,
profunde dankas la delongan kunlaboron kaj amikecon inter niaj du
organizaĵoj, kaj dediĉas sin plu al harmonia kunlaboro en la estonteco.

PRO TIO, KE ili kunsubvenciis tiun ĉi dulandan kongreson;

PRO TIO, KE ili faris tiom multe da laboro por certigi, ke NASK kaj la Dulanda Kongreso povos okazi samloke en Toronto;

PRO TIO, KE ĝiaj estraranoj ofte buntigas la Esperantan etoson per siaj spertoj kaj lerteco;

PRO TIO, KE ili kunlaboras kun Esperanto-USA kaj KEA en tiom da projektoj por la plifortigo de la Esperanto movado en Nord-Ameriko;

PRO TIO, KE ni esperas kunlabori plue en la estonteco por subteni niajn komunajn valorojn;

TIAL Esperanto-USA kaj KEA, kunvenante en sia dulanda kongreso, profunde dankas al Esperantic Studies Foundation por la kunlaboro kaj amikeco inter niaj organizaĵoj.